


ESPERANTOLEHTI

Esperanta Finnlando ♦ Esperantobladet ♦ syskuu ♦ septembro ♦ 4/2012



Jen raporta fotokolekto
pri la Aŭtunaj Tagoj 2012
en Alando, p. 8



Mihin katosi suomalainen kielipolitiikka? p. 4–7

- ♦ Kanto de arbarano, p. 3 ♦ Sed kie estas la pagodo? p. 20
- ♦ Esperanto-kurso de EAF ĉi-somere en Espoo, p. 14

ESPERANTOLEHTI

Esperanta Finnlando ♦ Esperantobladet

ISSN: 0787-8206

Kielipoliittinen kulttuurilehti. Suomen Esperantoliitto ry:n äänenkannattaja.
Språkpolitisk kulturtidskrift. Organ för Esperantoförbundet i Finland.
Kultura periodaĵo lingvopolitika. Organo de Esperanto-Asocio de Finnlando.
Perustettu/Grundad/Fondita 1918. Esperantolehti ekde/från 1989 lähtien.
Esperanta Finnlando 1918–23, 1948–53, 1959–1987.
Ilmestyy viisi kertaa vuodessa. Utkommer fem gånger i året. Aperas kvinfoje jare.

Toimitusryhmä/Redaktionsgrupp/Redakta grupo: ✉ eafgazeto@esperanto.fi
Päätoimittaja/Chefredaktör/Ĉefredaktoro: *Robert Bogenschneider*
Rusthollintie 6 C 10, 28430 Pori ✉ robog@gmx.de
Taitto/Layout/Enpaĝigo: *Maj-Lis Krouvi* ✉ maj-lis@maisanpaja.info
Vastaava toimittaja/Ansvarig redaktör/Respondeca redaktoro: *Tuomo Grundström*

Tilauhinta/Prenumerationspris/Abonprezo: 22 e/vuosi/år/jaro
Jäsenhinnat: katso jäsenjärjestöt-sivu/ Por membroj: rigardu antaŭlastan paĝon

Tilaukset, osoitteenmuutokset/Abonoj, adressanĝoj:
Suomen Esperantoliitto, Siltasaarenkatu 15 C 65, 00530 Helsinki.

☎ 044 2642 742 ✉ eaf@esperanto.fi

Prenumerationer, adressförändringar: EAF, Broholmmsgatan 15 C 65, 00530 Helsingfors.

Pankkitili/Bankkonto: FI11 8000 1700 2308 25 DABAFIHH (Sampo 800017-230825).

Julkaisija/Utgivare/Eldonanto: Suomen Esperantoliitto ry – Esperanto-Asocio de Finnlando.
Painosmäärä/Upplaga/Eldonkvanto: 330

Kannen kuva: *Sakari Kauppinen* / Pommern

Esperanto-Asocio de Finnlando ♦ Suomen Esperantoliitto ry

Fondita/Perustettu/Grundad: 1907

Prezidanto/Puheenjohtaja/Ordförande: *Tuomo Grundström*
Anundilankatu 3, 26100 Rauma. ☎ 050 5180 590, (02) 822 7779 ✉ eafprezidanto@esperanto.fi

Vicprezidanto/Varapuheenjohtaja/Vice ordförande: *Päivi Saarinen*
Ruorimiehenkatu 5 C 23, 02320 Espoo. ☎ (09) 813 3217 ✉ paivi.saarinen@iki.fi

Sekretario/Sihtööri/Sekreterare: *Tiina Oittinen*
Puutarhakatu 26 A 11, 20100 Turku. ☎ (02) 230 5319 ✉ eafsekretario@esperanto.fi

Aliaj estraranoj / Hallituksen muut jäsenet / Övriga styrelsemedlemmar:
Tiina Kosunen, Viittakorpi 2 D 22, 02280 Espoo. ☎ 09 813 3024, tiina.kosunen945@gmail.com
Paula Niinikorpi, Rusthollintie 6 as. 10, 28430 Pori. ☎ 040 527 4821 ✉ paula.niinikorpi@gmail.com
Jukka Nikoskelainen, Pohjolankatu 11, 20100 Turku. ☎ 050 525 3745 ✉ juknik@utu.fi
Keith (Keke) Uber, Poutapolku 3 B 30, 02110 Espoo. ☎ 040 413 4252 ✉ keith_uber@yahoo.com

Vicestraranoj/Varajäsenet/Suppleanter:
Tapani Aarne, Epilänkatu 41 E 7, 33270 Tampere. ☎ 050 5245 823 ✉ tapani.aarne@mbnet.fi
Robert Bogenschneider, Rusthollintie 6 as. 10, 28430 Pori. ☎ 040 352 4685 ✉ robog@gmx.de
Börje Eriksson, Erkontie 24 C 11, 16300 Orimattila. ☎ 040 779 3487 ✉ esperarto@phnet.fi

Kasisto/Rahastonhoitaja/Kassör: *Tiina Kosunen*
Viittakorpi 2 D 22, 02280 Espoo. ☎ (09) 813 3024 ✉ eafkasisto@esperanto.fi
Pankkitili/Bankkonto (EAF): FI11 8000 1700 2308 25 DABAFIHH (Sampo 800017-230825).

Peranto de UEA / Maksut UEA:lle / Betalningar till UEA:
FI66 8000 2005 9953 69 DABAFIHH (Sampo 800020-5995369) (UEA/EAF Päivi Saarinen)
Adreso ĉe la EAF-oficejo. / Käytä Suomen Esperantoliiton toimiston osoitetta.

Officejo/Toimisto/Kontor: Siltasaarenkatu 15 C 65, 00530 Helsinki, avoinna tiistaisin klo 17–19.
☎ 044 2642 742 (puh.vastaaaja/respondilo). Malfermita: marde 17–19-a horo ✉ eaf@esperanto.fi

Internet: www.esperanto.fi ♦ www.facebook.com/Finnlando ♦ Twitter: @finnlando aŭ twitter.com/#!/finnlando

Funebru al Olavi Kantele (1920–2012)

– eterne konservas la memoron

Fost via forveturo, nia kara,
Mi ne legas plu sur CIRKULERO
Sopire mi similas la plenlumon,
malkreskas ĉiunokte jam la brilo.

Ho, ĉiam sopirata!
Kruelas la sufero!
Kie troviĝas nun, ho, la vango?
Nur predikvoĉo restas sama en aŭtuna brizo!

En malcerteco vivas la vivanto,
Por ĉiam jam finiĝis la mortinta!
Kiel herbet' repagu per dankemo!
La Diamon de l'printempa festo!

Ĉina intima amiko dum 60 jaroj
Hsu Chungmu (Xu Zhongmu)



Aleksis Kivi:

Kanto de arbarano (Metsän poika)

esperantigis *Allan Mehtonen (1922–2012)*

Aŭdu arboj, aŭdu montoj,
aŭdu la arbara reĝ'.
Vin salutas filo juna
vervoplana en fortec'
venante kiel la vento.



Filo de arbaro volas
esti mi en tiu hejm'.
Sur la Tapiolaj kampoj
kun la urso luktas mi,
kaj fore estu la mondo.

Sur la verda planko tie,
kie muroj ĝenas ne,
sub la alta stela tendo
paŝas kaj kantadas mi,
kaj vaste rulas sin eĥo.

Kies voĉo tie sonas?
De l'arbara virgulin'!
Viron volas alkonduki
per dancado sur la voj',
kaj oraj bukloj svingiĝas.

Rava estas paco tie,
prava lukto por la viv'.
Muĝas ŝtormo, bruas vento,
fajre batas fulmosag',
kaj krake falas piceo.

Filo de arbaro volas
esti mi en tiu hejm'.
Sur la Tapiolaj kampoj
kun la urso luktas mi,
kaj fore estu la mondo.



Onko Suomessa kielipolitiikkaa?

Osa 2: Mihin katosi suomalainen kielipolitiikka?

Viime numeron artikkelissani totesin, että sanaa kielipolitiikka käytetään Suomen poliittisessa keskustelussa lähinnä haukkumasanana. Näin ei kuitenkaan ole aina ollut. Suomalaisen kielipolitiikan historiassa on eräitä avainajankasjoja, joitten kautta siitä, että suomi oli vain kansanomaiainen puhekieli ilman kirjallista ja opillista perinnettä on tultu nykytilanteeseen, jossa suomi on kokonaisen ja itsenäisen valtion pääkieli ja kaikilla ihmiselämän aloilla toimiva kirjakieli.

Mikä on politiikkaa

Tässä on aluksi syytä määritellä, mitä tarkoitetaan poliittinen ja mikä toiminta ei ole poliittista. Sana 'politiikka' pohjautuu kreikan sanaan 'polis', kaupunkivaltio. Poliksen oleellinen piirre erotuksena jostain muusta kaupungista on, että polis muodosti sellaisen toiminnallisen yhteisön, jossa sen jäsenet, itse ja yhteisönä, organisoituivat päättämään asioistaan yhteiseksi hyväkseen. Näin ymmärrettyinä politiikka nykyäänkin eri kokoisten yhteisöjen tasolle sovellettuna tarkoittaa sitä, että yhteisö muodostaa omasta keskuudestaan organisaation, joka tekee yhteisiä päätöksiä siitä, mitä yhteisön kokonaisuutena olisi tehtävä. Poliitiikkaa eivät ole yksityisten ihmisten teot eivätkä yhteisön ulkopuolelta tulevat määräykset tai olosuhteitten pakosta muodostuvat asiantilat.

On huomautettava, että tietenkin yksittäisen ihmisen yksityisillä teoillakin voi olla poliittinen motiivi. Terrorismi, tiedostavan kuluttajan ostopäätökset, kantaottavat lehtikirjoitukset, nämä ovat esimerkkejä asioista, joissa ihminen yksin toimivanakin voi haluta tuottaa poliittisia vaikutuksia. Kuitenkin teot muuttuvat poliittisiksi vasta silloin, jos ne onnistuvat vaikuttamaan laajemmin yhteisön käyttäytymiseen, siis jos yhteisö päättää ruveta yhdessä toimimaan sen esimerkin tai vaatimuksen mukaan, jota joku ihminen aluksi on yksityisesti ajanut.

Edellistä määritelmää seuraten kielipolitiikka tarkoittaa sitä, että yhteisö pyrkii muodostamaan

keskuuteensa yhteistä päätöstä siitä, mitä kieliä yhteisön jäsenten on syytä osata ja käyttää. Kielipolitiikkaa ei siis ole esimerkiksi oma henkilökohtainen päätökseni siitä, millä kielellä kommunikoin jonkun muun henkilön kanssa, mitä kieliä päätän opiskella, tai millä kielellä tuotan tekstejä.

Suomalaisen kielipolitiikan vaiheita

Suomen kielen ja suomalaisuuden poliittisen agendan alkuvaiheeksi voidaan katsoa 1800-luvun alku tai aikaisintaan 1700-luvun loppupuoli. Sitä varhaisemmat vaiheet suomen kielen tietoisessakin kehittämisessä olivat vain reagointia yksittäisten ihmisten tarpeisiin, siihen, että suurin osa Suomen alueella elävistä ihmisistä kuitenkin puhui vain sellaista kieltä, joka oli laskettavissa nimikkeen "suomen kieli" alle, ja että näillä ihmisillä oli tarve saada ensinnäkin kehityksi heille ymmärrettävä suomen kirjakieli, ja toiseksi sen jälkeen saada tietoa tällä suomen kielellä.

1800-luvun alussa syntyi ajatus, jonka mukaan suomalaiset voisivat olla itsenäisenä yhteisönä toimiva kansakunta. Johtolauseeksi tiivistettiin "ruotsalaisia emme ole, venäläisiksi emme tule, olkaamme siis suomalaisia". Ensimmäisenä tämän ajatuksen manifestaationa toteutui hallinnollisena alueena Suomen suuriruhtinaskunta. Suomi ei aluksi ollut sen hallinnossa käytössä edes toisena virallisena kielinä. 1800-luvun puoliväliin mennessä muotoiltiin vaatimus, että kansan enemmistön kieli on saatava toiseksi viralliseksi kieleksi ruotsin rinnalle käyttöön, mikä toteutuikin.

Ehkä kaikkein kriittisin vaihe suomalaiselle kielipolitiikalle on vallinnut 1800-luvun viimeisistä vuosista noin 1930-luvun alkuun. Lause "ruotsalaisia emme ole, venäläisiksi emme tule, olkaamme siis suomalaisia" oli jo vuosisadan ikäinen. Se nousi erityisen ajankohtaiseksi, kun toisaalta Venäjän johto halusi yhtenäistää valtakuntaa, kielellisesti venäläistää, ja toisaalta

koska luonnontieteellinen tietämys maailmasta edistyi nopeasti, mutta suomenkielistä korkeakouluopetusta ei ollut. Suomen ainoa yliopisto toimi vain ruotsiksi.

Venälaistämisyrikkymykset johtivatkin sitten suomalaisten määrätietoiseen kielipoliittiseen toimintaan, sillä ne olivat osasyynä vuoden 1905 suurlakkoon - toki vain osasyynä, ensisijaista oli kuitenkin parlamenttilaitoksen ja koko poliittisen järjestelmän uudistaminen demokraattisemmaksi, ja siinä Suomen suurlakko liittyi myös koko Venäjällä samana vuonna jo olleeseen suurlakkoon. Joka tapauksessa suomalaisen venälaistämistä vastaan suunnattu kielipoliittinen liikehdintä johti täydelliseen menestykseen maan itsenäistyessä.

Itsenäistymisen jälkeen kielipoliittinen aktiivisuus kohdistui suomen ja ruotsin kielten suhteiden järjestelmiseen. Tässä oli avainasemassa yliopistolaitos. Kielipoliittikan johdattamana päädyttiin pian perustamaan uusia yliopistoja, ensin vuonna 1918 ruotsinkielinen Čbo Akademi ja sitten vuonna 1920 Turun yliopisto. Ne perustettiin lahjoitusvaroilla ja yksityisinä, jollaisina ne 1950-luvulle asti pysyivätkin. Tähän kielipoliittinen taistelu ei vielä päättynyt, sillä Helsingin yliopisto oli kuitenkin maan suurin ja oli suuret paineet muuttaa se suomenkieliseksi. opiskelijoista enemmistö oli suomenkielisiä jo 1800-luvun lopussa. 1930-luvulla Helsingin yliopisto säädettiin kaksikieliseksi ja korkeakoulujen kielikysymys asettui vähitellen aloilleen, ja suurin osa Suomen korkeakouluopetuksesta on siitä lähtien ollut suomenkielistä.

Ulkosuhteitten kielipoliittinen suunnanmuutos

Uusi vaihe tuli kielipoliittisten ulkomaansuhteitten järjestelmissä toisen maailmansodan jälkeen. Siihen asti suomalaisten ulkomaiset yhteydet olivat suuntautuneet lähinnä Saksaan ja saksa oli ollut yleisimmin opiskeltu vieras kieli. Suomalaiset opiskelijat olivat hakeneet kansainvälistä oppia yleensä Saksan yliopistoista ja tieteellisiä julkaisuja oli luettu ja kirjoitettu paljon saksaksi. Kun Saksa nyt oli natsiajan ja maa-

ilmansodan heikentämä, tuli suomalaisillekin eteen valintatilanne. Monet olisivat halunneet jatkaa perinteistä saksalaisten yhteyksien linjaa, toiset näkivät, että englanninkieliset maat ovat jo niin suuri ja edelleen nouseva tekijä maailmassa, että on edullisempää ruveta opiskelemaan pääasiassa englantia.

Debattia käytiin ja kielipoliittinen muutos tehtiin, englannista tuli nopeasti Suomessa yleisimmin opiskeltu vieras kieli. Nyt jälkepäin voidaan todeta, että päätös pysyä saksalaissuuntauksessa olisi tuskin kuitenkaan ollut muuta kuin viivytystä väistämättömän edessä, nykyään saksalaiset itsekin lukevat ja julkaisevat tieteelliset artikkelinsa englanniksi, tekevät ja kuuntelevat englanninkielistä musiikkia, mainostavat kaupallisia tuotteitaan omassa maasaankin englanninkielisillä mainoslauseilla jne. niin että voi kysyä, onko saksan kielikin vähitellen väistymässä ja katoamassa.

On usein sanottu, että suuntautuminen varhain voimakkaasti englannin kieleen oli Suomelle onnistunut valinta ja mahdollisti erälle teknologia-yrityksille maailmanlaajuisen menestyksen. Paras esimerkki on Nokia, jossa suureksi osaksi on työkielenä englanti ja nykyään Suomessa toimiva pääjohtajakin puhuu äidinkielenään englantia. Tämä voi olla totta, mutta tilanne vaatii myös jo kysymään, mihin olemme ajamassa oman kielimme tulevaisuuden. Tietenkin voimme ottaa sellaisenkin asenteen, että ei se mitään haittaa, vaikka suomen kieli kokonaan katoaisi. Ennen kuin sen annetaan tapahtua, olisi asia otettava kunnolliseen poliittiseen debattiin ja tehtävä itsellemme selväksi, mitä se meille merkitsee.

Sisäisen kielipoliittikan laimeat vuosikymmenet

1930-luvun jälkeen Suomen sisäisessä kielipoliittikassa on eletty melko rauhallisia aikoja. Maan hallinto kaikilla tasoilla toimii kahdella kielellä, molemmilla kielillä on omat koulutusväylänsä eri alojen korkeakoulututkintoihin asti, kummallakin kielellä toimii kattava mediaverkosto, eikä kieliryhmien välillä ole mainittavaa vihanpitoa. 1970-luvulle asti tästä kuviosta tosin kaikki muut

maassa puhutut kielet kuin suomi ja ruotsi melko täysin unohdettiin, vaikka maassa oli mm. alueita, joilla enemmistö puhui saamen kieltä.

Nyt viime vuosikymmeninä on tuotu suomen ja ruotsin rinnalle viralliseksi aluehallinnon kieleksi pohjoisimmille alueille saame. Myös romanin ja viittomakielen tuomista hallinnon kieliksi on aloitettu. Nämä pienet vähemmistökielet kuitenkin koskettavat hyvin harvoja suomalaisia, ja siksi on päädytty siihen, että kielipoliittista keskustelua ei juurikaan ole. Perustuslaki määrää, että maan viralliset kielet (”kansalliskielet” perustuslain tekstissä) ovat suomi ja ruotsi (vähemmistökielinä perustuslaki mainitsee lisäksi saamen, romanin ja viittomakielen). Sen jälkeen kielilaki ja eräät muut lait aika pitkälti määräävät näitten kielten viranomaiskäytön pyrkimyksenään, että suomi ja ruotsi olisivat mahdollisimman tasa-arvoisesti käytössä. Näitten lakien pohjalta pidetään myös kiinni siitä, että kaikille suomalaisille opetetaan koulussa suomea ja ruotsia.

Kun asiat ovat lakien voimalla pitkälle säädeltyjä, ei oikein jää tilaa kielipolitiikalle, siis pohdinnalle siitä, mikä on minkäkin kielen rooli ja tarkoitus yhteiskunnassa, millaiseen kielenosaamiseen pyritään ja mitä hyötyjä on jonkin tietyn kielen laajasta osaamisesta ja käytöstä. Esimerkiksi kuntien käyttämän kielen suhteen ei jää harkinnanvaltaa, vaan kielilain määrittelemän matematiikan mukaan vain lasketaan, onko kunta suomenkielinen, ruotsinkielinen vai kaksikielinen, ja sen mukaan toimitaan. (Poikkeuksena sentään on, että laskennallisesti yksikieliseksi määräytyvä kunta voi hakea vapaaehtoisesti kaksikielisen kunnan statusta.)

Kielilaki ei jätä harkinnanvaltaa siihenkään, että kuntaan voisi kuulua erikielisiä osia, vaan jokainen kunta on lain mukaan kokonaisuutena yksikielinen tai kaksikielinen. Tämä koskettaa erityisesti omaa kotikaupunkiani Turkuja, ja erityisesti nyt, kun valtiovallalla on hanke suurentaa kuntia. Turku on siitä poikkeuksellisessa tilanteessa, että se on kaksikielinen ilman yhtään ruotsinkielistä tai kaksikielistä rajanaapuria. Naapurikuntien liittäminen Turkuun tarkoittaisi,

että alueeltaan entistä laajempi Turku olisi edelleen kaksikielinen, mutta entistä pienemmällä osuudella ruotsinkielistä väestöä. Tällainen kehitys, jossa laajennettaisiin ja samalla laimennettaisiin ruotsinkielisen hallinnon aluetta, ei kuulosta järkevältä ruotsinkielisen kieliyhteisönkään kannalta. Sehän tarkoittaisi, että ruotsin kieli entistä laajemmin olisi vain hallinnollinen muodollisuus ilman elävää yhteyttä kansalaisten todelliseen kielenkäyttöön. Samantapaisessa tilanteessa ovat kyllä eräät muutkin kaksikieliset kunnat, vaikka Turku pelkkiiin yksikielisiin kuntiin rajoittuvana kaksikielisyyden saarekkeena muita korostetummin. Tässä todellakin kaivattaisiin keskustelua siitä, mikä meillä oikein on kaksikielisyyden ja ruotsin kielen rooli ja tarkoitus.

Kielipoliittinen keskustelu lähtisi ehkä kunnolla käyntiin, jos kielilakia haluttaisiin ruveta uudistamaan, mutta koska nykyinen laki on melko uusi, vuodelta 2003, sen kokonaisuudistukseen tuskin lähivuosisikymmeninä lähdetään. Yleensä lait ovat käytössä muutamia kymmeniä vuosia pääpiirteissään muuttamatta, edellinen kielilaki oli pienin päivityksin 80 vuotta. Tietysti pienet päivitykset myös nykyiseen kielilakiin ovat aina mahdollisia.

Voidaan tietysti arvella, että voimassa oleva kielilaki on hyvin onnistunut, jos kieliryhmien suhteet sen perusteella ovat ongelmattomat. Ehkä maassa ei ole syytä muuttaa mitään eikä silloin ole tarvettakaan kielipoliittiseen keskusteluun. Kielilain vuoden 2003 uudistuksen yhteydessäkään aiheesta ei voimakasta julkista keskustelua käyty, eivätkä lain sisällön muutoksetkaan olleet mitenkään suuria.

Mutta tässä ei ole kaikki. Jo ruotsinkielisen väestöosan pieneneminen ja muitten kielivähemmistöjen kasvu pakottavat jossain vaiheessa uudelleenarviointiin. Myös muutokset kansainvälisissä suhteissa tuottavat paineita uusiin järjestelyihin. Seuraavassa numerossa jatkan pohdiskelua tulevaisuuteen: mitä suomalaisessa kielipoliittisessa keskustelussa olisi otettava tarkasteltavaksi?

Mikko Mäkitalo

Kvaronmilo en Nitra



Kiu lernas Esperanton per interreto, apenaŭ povas ne koni la retejon lernu.net. La organizo malantaŭ ĝi, E@I (Esperanto/Edukado... en Interreto, <http://ikso.net>), ŝatas pli bone ligi kaj interkonatigi la lernantojn kaj tial aranĝas unusemajnan renkontiĝon, kie *lernu!*-anoj kunvenas persone, do malvirtuale.

En la jubilea Esperantojaro 2012 okazis intertempe la sesa SES (Somera Esperanto-Studado, <http://lernu.net/ses>) de E@I en la slovak-a urbo Nitra. Kun 250 partoprenintoj (aliĝis preskaŭ 300) en varma kaj ĉarma loko, eblis konvene pliprofondiĝi en la lingvo kaj agrable pasigi

tempon kun samideanoj el 23 landoj.

Post matenaj kaj posttagmezaj lecionoj en deko da grupoj kun rekorda kvanto da 14 instruistoj laŭ diversaj niveloj ĉiu trovos taŭgan instruon al si. Krome okazis la seminario "Per flugiloj de malfacila vento" por instruemuloj.

Partopreno de tiom da diversaj homoj garantias varian programon: prezentoj, ĉiuvesperaj koncertoj aŭ teatraĵoj, ekskursoj aŭ promenoj en la apudeco (la kunvenejo situas piede de la monto Zobor, de kiu haveblas bela rigardo super la urbon) donas ion al ĉiu.

Al mi aparte plaĉis la vizito de la artmuzeo *Danubia* en slovak-hungar-aŭstra limangulo, aŭ la subtekstitaj filmoj, kiuj vespere projekciiĝis post la programo – krom revidi iujn konatojn kaj renkonti novajn geĉarmulojn.

SES 2013 estas planata en slovak-a *Martin*, kie loĝas *Stano Marček* – en ejo, kiu disponas pri sensaciaj 800 lokoj.

Eble ankaŭ vi emas sperti la junecan viglon de lernu-anoj persone?

Robert Bogenschneider

Allan Mehtonen forpasis 26.6.2012



Mi akceptis la informon pri la foriro de Allan Mehtonen kun granda malĝojo. Li estis bona homo, elstara esperantisto, granda samideano.

Allan estis esperantisto en dua generacio, lia patro estis entuziasma esperantisto. Laŭ la arkivo de UEA Allan estis registrita kiel membro de UEA en 1947. De 1950 ĝis 2005 li estis delegito en Oulu, intertempe en Kalajoki.

Inter miaj plej agrablaj memoroj restas la kunlaboro kun Allan en Esperanto-Societo de Oulu, kiu estis fondita en 1978. Allan estis la unua prezidanto, kio nur formaligis la statuson, kiu li jam antaŭe havis kiel la esperantisto nu-

mero unu de la urbo. En la urba laborista instituto li instruis Esperanton jardekojn.

Dum la prezidanteco de Allan la societo estis ege aktiva. Allan ankaŭ tradukis, kun tre fajna lingva sento, kantojn kaj kelkajn rakontojn, ekzemple de Teuvo Pakkala.

Daŭran valoron havas la libro de Allan pri la historio de Esperanto en Oulu, "Sata vuotta kieltä toivomiehellä". Nun kiam kaj Allan kaj Stanislawa-Kristina Mehtonen estas for, tuta epoko en tiu historio estas fermita. Al Esperanto-Societo de Oulu la laboro de Allan restas kiel defio por estonteco.

Mi funebras pro perdo de amiko kaj kunlaboranto. UEA funebras pro perdo de unu el siaj plej fidelaj membroj kaj delegitoj.

Osmo Buller

AT 2012 – El Alando

Jen raporta fotokolekto de *Sakari Kauppinen* pri la Aŭtunaj Tagoj 2012 en Alando.



Kvardeko da esperantistoj el Finnlando kaj Svedio veturis al Alando por ĝui la Aŭtunajn Tagojn de EAF. Ni ekveturis el Turku, la svedoj el Stokholmo, sed ni ĉiuj atingis Mariehamnon samtempe.



Kontraŭ pluvo kaj vento iras la vojo de esperantistoj. Vendredo estis ŝtorma, sed dum la ekskursata tago (sabato) la suno jam brilis kaj belega aŭtuna vetero dorlotis nin.



Kia bela tago, oni povis eĉ sunumi sin!



Gastoj el Belgio kaj Svedio atendas la komencon de la tuttaga ekskurso.



Nia unua celo estis la impona poŝtdomo de *Eckerö* per kiu la cara registaro montris sian potencon.

Petolaj buboj okazigis poresperantan manifestacion en la alanda parlamentejo.



Poste la vojaĝo daŭris al la kastelo de *Kastelholma*. Tie esperantistoj konatiĝis kun la vivo de antaŭaj generacioj.

En la memregada domo ni estis varme akceptitaj de konataj homoj. Poste ni vidis filmon kaj aŭdis klarigon pri la memregada sistemo de Alando.



Lunĉo estas jam prenita, memoraĵoj aĉetitaj, nun la ekskurso povas daŭri al la domo de la alanda aŭtoro *Anni Blomqvist*.



Lunĉo estis servita en la restoracio de *Jan Karlsgården (Jan Karlsgårdens Wårdshus)*. Ni manĝis viandobuletojn de bopatrino kaj kiel deserton alandan patkukon.



Kvin homoj, kvin nacioj – sed ĉiuj parolas unu lingvon.

Rio kun miro



Per siaj 8,5 miliona kvadratkilometra areo kaj 205 miliona homarkvanto Brazilo estas la plej granda ŝtato en Suda Ameriko. Samdimensie ĝi estas la kvine plej granda ŝtato en la tuta mondo. Ĝi estas federacia ŝtato konsistanta el 26 partaŝtatoj. Kaj Rio de Janeiro estas granda brazila urbo, kiu havas 12 milionojn da loĝantoj. Nuntempe ĝi estas duegranda urbo en la lando post Sao Paulo, kiu havas 20 milionan loĝantaron. En la jaro 1960 Rio perdis la ĉefurban statuson al la nova ĉefurbo Braziljo, sed Rio neniam perdos sian statuson esti unu el la plej belaj urboj en la mondo.

La unua gazetartikolo pri Esperanto aperis en Rio en la jaro 1898. La komenca jaro de la organizita esperanta movado estas 1906. Naskiĝis Brazila Klubo Esperanto (*Clube Brasileiro de Esperanto*). Kvankam enhavante en la titolo la nomon Brazila, post la fondiĝo de Brazila Esperanto-Ligo, Brazila Klubo fariĝis nur loka asocio. Okazis kursoj kaj oni fondis Brazilan Beltran Akademion, kiu foje sukcesis allogi 800

homojn por aŭskulti la prelegon "De Babelo ĝis Esperanto". En la sekva jaro okazis en Rio la Unua Brazila Kongreso de Esperanto, kiu kulminis per la fondo de Brazila Ligo Esperantista (poste Brazila Esperanto-Ligo).

Dum la 1910-aj jaroj Esperanto ĝuis prestiĝon en la socia medio de la urbo. La esperantaj eventoj estis amplekse disvastigataj en la lokaj ĵurnaloj. Famaj verkistoj opiniesprimiĝis favore al la lingvo. En la jaro 1912 okazis en Rio la unua Brazila Kunveno de UEA (Kongreseto) kaj en la sekva jaro la kvina Brazila Kongreso de Esperanto, organizata de Brazila Esperanto-Ligo.

Dum la jardeko 1930-a pro gravaj politikaj internaj problemoj, kiel internaj militoj kaj kresko de faŝismo kaj naciismo, la movado malvigliĝis. Tamen en la jaro 1936 okazis en Rio la naŭa Brazila Kongreso de Esperanto. Ĝi estis apogata de registaraj aŭtoritatoj, sed partoprenis malmultaj esperantistoj. Oni konstatis ke unu el la kialoj de malintereso estis la manko de libroj. Tiam oni konsentis, ke Brazila Spiritita Federacio de tiam komencu eldoni librojn pri Esperanto. Tiamaniere Esperanto fariĝis ligita al spiritismo. Tio estas kurioza afero, ĉar Esperanto devus esti sendependa de religio kaj politiko.

Oni diras ke la tempo de la 1940-aj jaroj estas unu el la plej pozitivaj por la Esperanto-movado en Rio. Estis fonditaj novaj grupoj, okazis kampanjoj kaj prelegoj. En la jaro 1945 okazis en Rio la deka Brazila Kongreso de Esperanto kun partopreno de preskaŭ 600 esperantistoj. En la jaro 1954 estis fondita la esperanta asocio Kultura Kooperativo de Esperantistoj kun la ĉefa celo fariĝi esperanta eldonejo funkcia komence en la sidejo de Esperanta Asocio de Rio. Poste ĝi akiris propran sidejon en la urbocentro komencante siajn aktivecojn en la jaro 1956. La 15-a Brazila Kongreso de Esperanto okazis en

la najbara urbo *Niteroi* en la jaro 1957.

En la jaro 1961 estis kreita Esperantista Junularo de Campo Grande. Ĝi estis tre aktiva, sed kiam okazis la puĉo de 1964, la agado malkreskis pro la persekutado fare de la politika polico, kiu opiniis la kontakton de la junularo kun la socialismaj landoj politika agado. En la jaro 1985 la sidejo de Brazila Esperanto-Ligo estis translokigita de Rio al Braziljo.

La Esperanto-movado bone progresis pro multaj fervoraj aktivuloj dum la sekvaj jardekoj kaj daŭre progresas. Tion mi povis mem konstati dum miaj multaj vizitoj en la sidejo KKE (Kultura Kooperativo de Esperanto) aŭskultante prelegojn kaj partoprenante aliajn eventojn. La plej aktivaj en KKE nuntempe laŭ mia kompreno estas sinjoroj *Givanildo Ramos Costa*, *Jair Salles*, *Aloisio Sartorato* kaj *Alvaro Motta*. Ekzistas multaj aliaj fervore laborantaj, kiujn mi ĝis nun malpli bone konas.

Do, mi jam tri foje vojaĝis en la varman kaj amikan landon de Brazilo kaj ĉefe en la grandan mondfaman urbegon Rio de Janeiro. En la urbo mi trovis fidelan Esperanto-amikaron. Tuj dum mia unua vojaĝo en la jaro 2009 mi estis varme akceptata. Sinjorino *Telma Oliveira Ribeiro* afable gastigis min en sia hejmo, kiu situas en la urboparto *Urca* apud la Sukerpano-monto. Mi trovis sinjorinon *Telma* pere de la Pasporta Servo. Alia sinjorino *Neide Barros Rego*, kun kiu mi ankaŭ antaŭ la vojaĝo korespondis rete, unu tagon veturigis min en sia urbo *Niteroi* al la hejmo de la edza paro *Dulcydides de Oliveira Pinto* kaj *Therezinha de Maria Carvalho Pinto*, kun kiuj ŝi kutimas kanti. Ili surprizigis min aranĝante hejman koncerton por mi. La koncerto estis altkvalita kaj la hejmo belega. Neide kaj *Dulcydides* kantis kaj *Maria* pianoludis. Ĉeestis ankaŭ sinjorino *Telma* kaj la *Niterojoj* sinjorino *Graça Eliana Thuler Santos*, nuntempa prezidanto de la *Niterojo Esperanto Klubo*.

En la urbocentra Esperantoklubejo KKE (Kultura Kooperativo de Esperanto) mi konatiĝis kun multaj lokaj Esperantistoj kaj ankaŭ alilandaj, kiuj tiutempe vizitis la lokon. Sinjoro *Giva-*

nildo Ramos Costa petis, ke li min intervjuu en la radio, kie li laboras. Sinjoro *Aloisio Sartorato* intervjuis min en la klubejo kaj metis la intervjuon en interreton. Bedaŭrinde la alte estimata kaj fama esperantisto, poligloto, sinjoro *Sylla Chaves* mortis ĝuste antaŭ mia vojaĝo, kaj mi perdis la eblecon renkonti lin. Neide donacis al mi la libron *Brazila Esperanta Parnaso*, kiun ŝi redaktis kun *Sylla Chaves*. Krome Neide donacis al mi la kasedon de siaj kantoj.

Pasintprintempe sinjoro *Alvaro Motta* kun kelkaj aliaj klubanoj aranĝis Esperanto-tagon en Copacabana. Estis agrable kaj ĝojige vidi la verdan flagon flirti super la mondfama plaĝo. Oni disdonis broŝurojn kaj muzikis. Kelkaj preterpaŝantoj haltis por plua informo. La vetero estis varma kaj ĉarma kiel kutime en Rio. Same varma kaj ĉarma estis la etoso. Sinjoro *Filipe de Moraes Paiva* proponis, ke oni por la sekva jara karnavalo kolektu Esperantan samba blokon, kiu kantos, dancos kaj svingos la verdan flagon. La propono estis unuanime akceptita.

Pluan informon pri Esperanto en Rio de Janeiro kaj en Brazilo oni povas trovi en interreto. Vizitu la paĝojn de *Ipernity* kaj *Facebook*. Ekzistas videoj, intervjuoj, kantoj, prelegoj, fotoj, muziko, ktp. Ekzistas ankaŭ virtuala Esperanto klubo. Sinjoro *Aloisio Sartorato*, kiu estas tre laborema kaj lerta esperantisto, skribis la historieton de la Esperanto de Rio. Li kutimas preskaŭ ĉiutage sendadi interesajn mesaĝojn koncerne Esperanton kaj ankaŭ aliajn interesajojn, fotojn, videojn, ktp.

Ĉar Brazilo situas sur la suda hemisfero, tie regas somero kiam oni en Finnlando suferas pri la vintra malvarmo. La latitudo de Rio de Janeiro estas 22 gradoj 57 minutoj. La latituda linio trapasas Namibion kaj kelkajn aliajn landojn en la suda Afriko, Madagaskaron kaj Aŭstralion. Rio de Janeiro estas vizitinda urbo pro sia beleco kaj pro Esperanto.

Mi varme rekomendas.

Bruno Lehtinen

Sukcese kribrita esearo: "PRI HOMOJ KAJ VERKOJ"



Privata kuriero rekte el la Hanoja UK 2012 kunportis al mi freŝan eldonajon de UEA redaktitan de *Michela Lipari* kaj *Humphrey Tonkin*. Jen mi prezentas la libron "PRI HOMOJ KAJ VERKOJ – eseoj pri la Esperanto-kulturo", kiu tuj surgenuigis min. Esperantistoj ne tro entuziasme enprofundiĝas en la literaturon de la Zamenhofa lingvo. Lastatempe japanoj entreprenis ion pozitivan kaj fekundan tiurilate por stimuli beletran utiligadon.

Jen estas taŭga gvidilo por ĉiuj gesamideanoj – ankaŭ al komencantoj. Konvena longeco efike stimulas legemon. *Carmel Mallia* (1929) el la mediteranea insulo Malto en sia kontribuaĵo interese kaj el nova vidpunkto prezentis kaj analizis la konatan poemon "La Vojo" de Zamenhof. Tiaj tekstoj facile forigas barilojn, kiuj kelkfoje povas bremsi legemon pri poeziaĵoj.

Lena Karpunina (1963), ruso el Taĝikio, kiu nune vivas en Germanio, elektis interesan titolon por sia eseo: "Ni ne entombigu niajn literaturajn trezorojn". Ŝi mem aperigis du librojn: "La Bato" en la jaro 2000 kaj "Neokazinta amo" 2007, ambaŭ ĉe la Flandra Esperanto-Ligo. Trafajn rimarkojn ŝi notas pri eldonado en esperantujo kaj nelegemo de esperantistoj. Iom kaprice agadas iuj eldonistoj, kiuj tute hazarde elektas presotajn librojn. Grandioza escepto estas la hispano *Régulo Pérez* sur la insulo Tenerifo. Inter la jaroj 1952 kaj 1975 aperis sub la marko Stafeto entute 94 libroj. Tiaj geniaj eldonistoj naskiĝas ne ofte, eble unufoje en jarcento, konstatas Lena Karpunina. Unu kaŭzo por la nelegemo de esperantistoj estas, ke oni ne instruas ĝian literaturon aŭ faras tion tre ma-

lofte. Tamen *Vilmos Benczik* kaj *William Auld* siatempe multon faris ĉi-kampe.

Pri la periodoj de la Esperanta literaturo skribis kaj *Jukka Pietiläinen* kaj *Geoffrey Sutton*. Jam en la jaro 1984 William Auld prezentas kvar tempajn stadiojn literaturajn en la Esperanta Antologio kaj nur hezitime li algluas por ili jenajn etikedojn: 1. Primitiva romantismo 2. Matura romantismo 3. Parnasismo, 4. Postparnasismo. Jukka Pietiläinen (1966) prezentas mejloŝtonajn erojn el la centjara periodo 1887–1987 kaj demandas, ĉu jam antaŭvideblas la komenco de la kvina periodo. La iamaj antologioj ne ampleksis prozon, kiun devus inkluzivi novaj kolektoj. Tial la nomo de la kvina kolekto devus esti pli vasta. Geoffrey Sutton (1947) faras pripensindan proponon tiurilate: 5. Eksperimenta poezio; Popularigo de la romano. Ni ja konas la gigantan verkistan enciklopedion de Sutton eldonitan de Mondial anglalingve en Novjorko 2008.

Necesas ankoraŭ mencii *Sten Johansson* (1950), kiu multflanke kaj rave prezentis la konatan svedan verkiston kaj tradukiston *Stellan Engholm* (1899–1960). La alia eseo de Johansson kun la titolo "Bohemia amoro – Karolo Piĉ kaj Eli Urbanová" sidigis min sub la noktan legolampon per forta altiro. Lakone mi konstatas: indas ekkonatiĝi. Mi rekomendas.

Tuj post la tralego de la nova literatura verko de UEA mi mendis rekte el Malto kelkajn publikaĵojn de Carmel Mallia. Kompreneble ankaŭ la Libroservo ĉe UEA en Roterdamo tiucele helpas. Tre sincere kaj dankeme mi manpremas al la respondecoj de la Universala Esperanto-Asocio pro tio, ke maljuna veterano dank'al la libro "Pri homoj kaj verkoj" entuziasmiĝis kaj plivigliĝis. Mirinde efikis ĉi tiu 143-paĝa perleto.

Jorma Ahomäki

Somera Esperantokurso en Orivesi 8.–12.7.2013 Kesäkurssi Orivedellä 8.–12.7.2013

Unua informo

Venontsomere EAF kunlabore kun E-societo Antaŭen el Tampere kaj kun ELFI aranĝos some-
ran kurson en *Oriveden opisto* 8.–12.7.2013. La
eksterlanda instruistino estos *Dalia Pileckienė*
el Litovio. Loka aranĝanto kaj la finnlingva
instruisto estos *Sylvia Hämäläinen*. Aliaj per-
sonoj el Antaŭen kaj EAF helpas laŭbezono.
La partoprenantoj espereble multnombros en
ĉiuj niveloj de komencantoj ĝis progresantoj.
Ili ĉiuj certe lernos ion novan pri la lingvo. Pli
detalaj informoj aperos plej eble baldaŭ en niaj
retpaĝoj kaj en sekvaj numeroj de Esperanto-
lehti.

Ensi kesän kielikurssimme on Oriveden opistol-
la 8.–12.7.2013. Kurssille otetaan opiskeluryh-
miä aloittelijoista kertaajiin sekä myös pitem-
mälle ehtineitä. Ulkomainen opettaja on Dalia
Pileckienė Liettuaasta ja suomenkielisenä opetta-
jana Sylvia Hämäläinen Tampereelta (sylvia.h@
kolumbus.fi). Lisätietoja tulee nettisivuillemme
mahdollisimman pian. Kurssista voi tiedustella
Sylvialta ja EAF:n kurssivastaavalta.

Tiina Oittinen, kursorespondulo/kurssivastaa-
va (EAF) – yhteystiedot s. 2 (kontaktinformatio-
jn p. 2) *Sylvia Hämäläinen*, muut yhteystiedot
jäsenjärjestöt-sivulla (kontaktinformatiojn en la
antaŭlasta paĝo sub ELFI)

Aŭtune en Turku

- Vizito al Arta Muzeo merkrede
10-an de oktobro je 17–19
- Esperantokursoj en Civitana Insti-
tuto de Aurala (Auralan kansalais-
opisto) marde je 15.30–19.00
- Renkontiĝoj en la biblioteka kafe-
jo Sirius, Linnankatu 2, merkrede
je 16.30–17.30
- Julia festeto en NNKY-salono,
marde la 18-an de decembro je
17.30–20.00
- *Informiĝu ĉe Esperanto-Societo
en Turku, kontaktinformoj en la
antaŭlasta paĝo*

La unua Premio Diana Aitai al Zhao Wenqi

La ĉina junulo Zhao Wenqi fariĝis la unua rice-
vanto de la Premio Diana Aitai, kiun UEA stari-
gis per donaco de la estona esperantisto Peeter
Aitai por omaĝi la memoron de lia filino Dia-
na, kiu forpasis nur 22-jara en tragika akciden-
to en januaro 2011. La premio celas rekoni kaj
kuraĝigi la plej junan aktivan anon de la Interna-
cia Koruso de Universala Kongreso. Diana Aitai
mem estis korusano en la UK-oj de Roterdamo
(2008) kaj Bjalistoko (2009).

La premio sendube faris al la 22-jara Zhao
Wenqi, studento de filozofio el la urbo Harbin,
lian unuan Universalan Kongreson eĉ pli memo-
rinda. Ĝi konsistas el diplomo kaj monsumo de
100 eŭroj. Kiel en pluraj antaŭaj UK-oj, ankaŭ
en Hanojo la Internacia Koruso estis gvidata de
prof. Alan Bishop el Aŭstralio.

Esperanto-kurso de EAF ĉi-somere en Espoo

Fotoj (Tiina Oittinen) el Facebook (<http://facebook.com/Finnlando>)

La ĉi-jara Esperanto-kursosemajno de Esperanto-Asocio de Finnlando okazis 11.–15.6. en Arla-instituto (oficiala nomo finne *Keskuspuiston ammattiopisto, Arlan toimipaikka*). Kursoaranĝo en Popola Instituto de Valamo ne eblis por tro malgranda nombro de partoprenantoj. Instruisto por la 5 kursanoj el 4 landoj estis *Atilio Orellana Rojas* kaj *Tiina Oittinen* kunestis kiel kursorespondulo. De lundo al ĵaŭdo estis ĉiutage lecionoj dum 4 horoj kaj posttagmeze okazis ekskursoj en la ĉefurba regiono. Marde la kursanoj vizitis en la oficejo de EAF en Helsinko kaj merkrede venis vespere kelkaj gastoj al la kursejo. Ni raportis pri la kurso kaj pri

la ekskursoj kun bildoj en paĝoj de Facebook. Samtempe kun la kurso de EAF komenciĝis en Arla-instituto dusemajna kurso aranĝita de Steleto. La partoprenantoj de ambaŭ kursoj renkontiĝis en la komunaj ejoj de la instituto, ekzemple dum lunĉopaŭzoj. Vendrede la kurso de EAF vizitis tiun de Steleto kaj diskutis pri diversajoj. La kursanoj *Alke* el Germanio, *Verena* el Svislando, *Jeanine* el Francio kaj *Leena* el Kuopio skribis pri siaj spertoj dum la kursosemajno. Venontsomere ni bonvenigas ĉiujn al Orivesi.

Tiina Oittinen

Somera kurso de EAF (11.–15.6.2012) en Espoo – kursanoj rakontas

Alke:

Finn-amo anstataŭ Valamo

Jam de kelka tempo mi volis viziti Finnlandon, unuflanke ĉar la lando kaj naturo jam delonge interesas min, aliflanke pro vizitotaj Esperanto-amikoj. Trian kaŭzon mi hazarde malkovris en la reto: Esperanto-asocio de Finnlando okazigas Esperanto-kurson. Do, aliĝi kaj ek al Suomio. El Rostock en norda Germanio, pramsiĝo transportis min al Helsinko. Post mallonga sed sufiĉe profunda esploro de la ĉefurbo, mi havas tre belajn kaj interesajn tagojn en Pori ĉe Robert kaj Paula. Sekvis mallonga vizito de Tampere, de kie mi pluveturis al Turku.

La iama finna ĉefurbo estis la loko de la antaŭkursaj ekskursoj. Tie, en la junulargastejo, mi kune loĝis kun *Verena* el Ĝenevo kaj *Jeanine* el Sudfrancio. Dank al *Leena* kaj precipe al *Tiina*, cetera aprobitaj turistaj gvidistinoj, ni ricevis abundajn informojn pri la historio, arto kaj la nuntempa vivo de la urbo kaj la regiono.

Tuj post mia alveno, mi rajtis kunesti oficialan inaŭguron de ekspozicio en la muzeo *Aboa Vetus & Ars Nova*. La sekvantan tagon, ni vizitis la malnovan urbon kaj ripozlokon *Naantali*. Tie ni konatiĝis krom kun belegaj lignaj domoj el antaŭaj jarcentoj kaj la somerpalaco de la prezidento ankaŭ kun la ĉarmaj muminoj.

Kion fari anstataŭe, se oni ne povas aŭ volas vojaĝi al Hanojo por partopreni en UK? Ĝui vietnaman etoson surloke! Tio eblis dum festa inaŭguro de la unua Budha templo de Finnlando. Kune kun la loka Esperantistaro ni tie rajtis partopreni specialajn ceremoniojn. Post informoj pri la preĝejo kaj la vietnamdevena popolo en Turku, oni regalis nin per bongustaj vietnamstilaj manĝaĵoj.

Dum nia antaŭkurso restado en Turku, ni krome vizitis la havenon, la gigantan kastelon kaj kelkajn de la surŝipaj restoracioj kaj trinkejoj kun muziko kaj en malstreĉa atmosfero.

Post la fino de la antaŭkursaj ekskursoj, ni



ĉefurbo dum la Helsinki-tago kun posta renkontiĝo kun lokaj Esperantistoj en la oficejo de Esperanto-Asocio de Finnlando. Belan kontraston liveris en alia tago nia, por mi tre impresa, migrado tra la nacia parko de *Nuukio*. Ĝuste tia mi imagis la finnan naturon. Neforgesebla aventuro estas la "Hitchcock-aj" minacoj de la murd-mevoj.

kune kun nia instruisto *Atilio Orellana Rojas* el Argentino/Japanio kaj *Tiina Oittinen* en la 11a de Junio trajne vojaĝis al *Espoo*. Ne kiel kutime en la Popola Instituto de Valamo, sed ĉi-foje en la Arla-Instituto en *Leppävaara* la Finna Somera Esperanto-lernejo trovis sian hejmon. Pro mia unua partopreno maleblas kompari la du domojn. Tamen mi povas konstati ke la Arla-Instituto pli ol sufiĉe kontentigis miajn bezonojn: Trankvilaj unuopaj dormĉambroj, komunaj kuirejo kaj loĝ-cambro por nia grupo, pretaj matenmanĝoj kaj tagmanĝoj varmaj en la granda manĝosalono, klasĉambroj je nia dispono, retaliro ktp.

Okazis samtempe du kursoj: Unu por komencantoj kaj komencintoj aranĝita de la membroasocio Steleto de EAF. Al progresantoj celis la alia kurso, kiu estis gvidita de Atilio kaj en kiu ni tri antaŭkursanoj partoprenis. Leena el Kuopio kaj *Kerttu* el Kouvola pligrandigis nian rondon. Atilio ne timis la longan vojaĝon el Azio. Nia sperta kaj kompetenta instruisto lernigis kaj diskutigis nin per diversaj ĉiutagaj kaj aktualaj temoj. Tiamaniere ni altigis miajn vortprovizojn, sed ankaŭ miajn sciojn pri aliaj landoj kaj kulturoj. Dank' al dumkurse verkigitaj kaj interŝanĝitaj kuirreceptoj, mi baldaŭ hejme elprovos pladojn kiel "Tradicia hordea grio kun ovobutero", "Provencaj Tomatoj" aŭ "Ĝenevstila Itala Pasto".

Ĉiam restis post la instruado en la posttagmezo sufiĉe da tempo por ekskursoj. Nia senlaciga respondeculo Tiina preparis por ni tre interesajn erojn kiel ekzemple viziton de la

preterpasante ilin, la sufiĉe grandaj birdoj fluge atakis nin, verŝajne por protekti siajn idojn.

Sekvata de permanĝa refortiĝo, ankaŭ nia vespera programo konsistis el kunaj aktivecoj, ekzemple ludado de la krucvortludo Skrablo. Dum festeto kun lokaj Esperantistoj, Tiina surprizis nin per violinludado kaj ni gaje akompanis ŝin kantante Esperante.

Bedaŭrinde, pro la horaro de la pramŝipo, mi jam devis forlasi la aliajn en la antaŭlasta tago, la 14an de Junio. Koran dankon al Tiina, Atilio kaj la aliaj helpantoj por la belegaj tagoj. Kalevala, Salmiakikossu, dezajno, saŭno, kuloj, muminoj kaj gastemaj Finnoj: Mi ne forgesos miajn feriojn en Finnlando, verŝajne iam revenos, sed nun adiaŭas per KIITOS!

Alke Geveke el Norda Germanio

Verena:

La restado en esperantokurso en Finnlando estis por mi sukcesa de la komenco ĝis la fino kaj mi kredas ke la celo estis atingita. Unua merito de la sukceso estis dank' al la organizo de Tiina kun ŝia spirito kaj sindonema volo por zorgi pri ni kaj fari ĉiam la plej bonan, ŝi eĉ sukcesis ĉarmi nin per ŝia violona vespermuziko. Certe, ni, la kvin lernantoj, estis privilegiiitaj esti tre malgranda grupo. La kondiĉoj de loĝejo kaj manĝo estis tre bonaj.

Mi lernis, ke en Finnlando oni manĝas ĉiun duan horon! Pro ekskursoj ni profitis koni plurajn lokojn interesajn kiel la urbojn de Turku, Naantali, Espoo, naturan parkon, ankaŭ iom



de Helsinki, ktp. Sed, la absoluta avantaĝo kaj ŝanco estis havi Atilion kiel instruiston. Inter la instruistoj kiujn mi konis ĝis nun dum la du jaroj kiujn mi estas en la esperanta medio, mi ne renkontiĝis kun iu alia kiel li. Li estas eksterordinara ne nur pro lia plejsupra kono de la lingvo, sed ankaŭ pro lia instrumaniĝo tiel interesa kaj vigla. Lerni kun Atilio estis vere plezuro, kaj ŝajnis ke ni ludis tuttempe. Ne kredu ke ni laboris kun aferoj verŝajne facilaj, malpezaj kaj malgravaj, ne, ĉar lia instruado ĉiam tuŝis grandan kvanton de ajnaj temoj, argumentoj, kaj aspektoj de la vivo. Entute, krome, tio faris ke ni, la kvin lernantoj, konis nin iom kaj ĉio kreis tre bonan kaj agrablan etoson en la grupo.

Mi ankaŭ ŝatus danki al la kamaradinoj kaj kamaradoj esperantistaj *Börje*, *Keith* (kaj aliaj kies nomojn mi ne memoras), kiuj afable ricevis nin, interalie *Päivi*, kaj ŝia edzo kiu gvidis nin sen tro granda damaĝo tra nuboj de kuljoj en la natura areo.

Dum tri tagoj post la esperantokurso, mi persone profitis pro viziti lokojn interesajn al mi profesie, tio estas diversaj muzeoj de arto, de arkitekturo kaj de dezajno, ktp. Sed mi faris ankaŭ ekskurson per ŝipo en la maro ĉirkaŭ Helsinki kie multaj insuloj kreas belegajn naturajn pejzaĝojn.

Mi iom lernis, multe vidis, multe konis, mi bedaŭras nur ke mi ne vidis eĉ unu alkon!

Finfine, mi revenis hejmen al Svislando iomete malsana ĉar la temperaturo finna estis iom malvarma kompare kun la somero en la sudo de Eŭropo.

Leena:

Verena Graf el Ĝenevo

Mi sentis ke la kurso estis intensiva kaj tre multedona. Por mi Esperanto estas rimedo konatiĝi kun personoj el diversaj landoj kaj tradicioj kaj kun kulturo de iliaj socioj.

Por tio ĉi ni havis bonajn eblecojn, ĉar ĉeestis nur kvin lernantoj el kvar landoj en nia kurso. La malgranda nombro de partoprenantoj utilis almenaŭ min, kiu nur komencis lerni Esperan-

ton antaŭ unu jaro: ĉiu el ni havis multe da tempo por paroli kaj demandi.

La programo estis bone planita: kvar lecionoj ĉiutage kaj ekskursoj posttagmeze. La ebleco por konversacio, kiam ni promenis kaj vizitis vidindaĵojn aŭ vagis en la bela natura parko de Nuukio, helpis uzon de Esperanto en variaj situacioj. Certe ĉiu el ni memoros la vorton *kulo* post tiu ĉi kurso!

La bela vetero, ĉarma ĉirkaŭaĵo kun florantaj siringoj, bongustaj manĝaĵoj, kaj antaŭ ĉio niaj grandiozaj kursospondulo Tiina kaj instruisto Atilio – dank’ al tiu ĉio la kurso estis kiel ĉielarko, kiujn mi deziras kolekti.

Leena Lindqvist el Kuopio

Jeanine:

Finnlanda Esperanta Kurso

Mi estas franca virino, kaj mi deziras plibonigi la uzon de la esperanta lingvo kaj mi ŝatas vojaĝi. Mi decidis partopreni al la kurso dum kvin tagoj en Finnlando, kaj trairi la landon poste.

Antaŭ la kurso: La 9an de junio, mi atingis *Vantaa*, la flughavenon de Helsinki. Tiina atendis min kaj post babilado ŝi metis min en buson por Turku. Mi devis trovi 2 aliajn eksterlandajn lernantinojn (Verena kaj Alke), kiuj ankaŭ volis viziti tiun faman urbon. Loka esperantistino akceptis min kun la lernatinoj en la busstacidomo. Ni kune iris al la hotelo kaj finfine mi metis mian valizon en la ĉambron. Ĝis lunde ni vizitis la urbon, ni fotis monumentojn, ni vagadis tra la stratoj, laŭ la rivero. Tre bona tempo por merĝi nin en la esperantan etoson kaj renkonti Atilion, nian estontan instruiston.

Lunde, ni vojaĝis per trajno ĝis *Espoo*, la urbo kie ni malkovris nian kursejon, kiu ankaŭ estas la profesia edukcentro por blinduloj aŭ vidhandikapuloj. Ankaŭ niaj loĝejoj troviĝis tie, en granda parko kun multe da arboj, da floroj, estis granda klasĉambro, dormoĉambro, kaj mangoĉambro.

En la kurso estis kvin studentinoj: 2 el Finnlando, 1 el Germanio, 1 el Svislando kaj mi el



Francio. Nia instruisto el Argentino laboras nun en Japanio. Ni nin prezentas kaj poste laboras ĉiutage Esperante ĝis la tagmanĝo. Bonajn plaĉojn kun diversaj desertoj. Ĉiun posttagmezon ni vizitas la ĉirkaŭaĵon: Merkrede ni trairas la nacian parkon Nuuksio kun loka esperantisto, marde ni promenas tra Helsinki, niaj okuloj malkovras diversajn stratojn, bazaron, famajn placojn, preĝejojn... ktp. Finfine lace ni trinkas kaj manĝetas kun aliaj esperantistoj de la regiono, kiuj atendis nin en la urbesperantejo. Ni babilas multe, kelkaj aĉetas esperantlingvajn librojn. Tre bona, gaja kaj amika etoso.

Surprize alia festo atendas nin. La komencinta grupo manĝas kun ni kaj ni aŭdas la violonon de Tiina, ni kantas kaj ni ludas vespere.

Jaŭde post la kurso kaj la tagmanĝo, ni vizitas en Espoon, loka esperanta gvidantino nin trairegas la novan urbon, artmuzeon, kaj al la marbordo. Surprize, la akvo estas malproksima, estas verda maro el kanoj kaj la arbaro tuŝas tiun maron. Ne bezonus banvestaĵojn!!! Atilio atendas nin kun botelo da roza ĉampano por trinki por la lasta vespermanĝo, al la amikeco kaj al la internacia lingvo, kiu ebligas tiujn mirigajn renkontiĝojn.

Sed tro rapide pasis la tempo, mi pensas. Vendrede, kurso sen Alke kiu jam foriras jaŭde, kaj adiaŭo en la stacidomo de Helsinki. Malfeliĉe jes.. kaj feliĉe ankaŭ ĉar por mi tio ne estas fino ... mi povos viziti dum ok tagoj Finnlandon dank' al kvar esperantaj familioj, sed tio estas alia rakonto.

Jeanine Ratouchniak el Francio

Memore pri Rajli Martinen

De la filino Kirsi mi ricevis la malĝojigan sciigon, ke la 23-an de septembro forpasis Raiili Martinen en la aĝo de 81 jaroj. Ŝi naskiĝis la 26-an de julio 1931, en la naskiĝtago de Esperanto.

Precize tri monatojn post Allan Mehtonen Esperanto-Societo de Oulu perdis alian kunfondinton kaj multjaran membron de sia estaro. Kiel filino de Karelio Rajli, kiel ŝi mem skribis sian nomon, provizis la societon per viglo kaj viveco. Ŝi estis la animo de la societo, sed kiel lerta kasistino ŝi ankaŭ trovis manierojn, por ke nia kaso ne dependu nur de membrokotizoj.

Rajli aktivis ankaŭ en la klubo Saskiat, kiu apogas lokajn artistojn. Tie ŝi varbis la

pentriston Pentti Junno fariĝi la kortega artisto de la societo. Junno dezajnis interalie la panelojn de la "trajno de amikeco", sur kiu estis afiŝitaj la verkoj de la ekspozicio de infandeseĝnaĵoj en 1979, kiu restas kiel legendo en nia memoro.

Ankaŭ ekster Oulu Rajli havis multajn geamikojn inter finnaj kaj alilandaj esperantistoj, por kiuj nun restas bela kaj gaja memoro pri ŝi. Kirsi skribis, ke ŝia patrino povis foriri en paco, ĉar "nenio restis nefinita".

Ankaŭ en nia societo neniuj taskoj, kiun ŝi akceptis, restis nefinita.

Dankon por ĉio, Rajli.

Osmo Buller

Komuna vojaĝraporto de du partoprenintoj

Mediteranea Esperanto-Semajno 2012 en Les Issambres

La krepusko falas sur la Mediteraneon la lastan tagon de la esperantoaranĝo MES. *Kerstin* sidas en nia ĉambro kun belega rigardo super la maro, super la vilaĝeto *Les Issambres* kun helflavaj domoj kaj la francaj belaj tegolaj tegmentoj. Diversaj specoj de pinarboj, ”ombrelaj pinarboj”, cipresoj, olivarboj, eĉ palmoj verdas inter la domoj. Ĉiun matenon dum tuta semajno estis mirakla sunleviĝo kun klara turkiza kaj rozkolora ĉielo, sur kiun la ruĝa suno naskiĝas el la maro. Nokte ni vidas kreskantan lunserson, stelojn. Inter la verdaĵo flavas plenflo-raj mimoz-arboj. Tuttage la suno varmigis nin kvazaŭ estus someraj tagoj, temperaturoj inter +12 kaj +15 °C, nokte ne frostis.

Iun posttagmezon dum la 4-hora libera tempo okazis ŝipa ekskurso al la insulo *Saint Tropez*, kie unuflanke situas malnova vilaĝo kun malnovstilaj domoj sub deklivo, sur kiu gardas granda citadelo de la 17-a jarcento. Je la alia flanko de la insulo pluraj miliarduloj de la mondo konstruis al si luksajn, imponajn, sed ne tre belajn somer-restadejojn (filino de *Jeltsin*, J-P. Belmondo, BB, estro de *Heineken* k.a.). Post promenado en la vilaĝo kaj en la citadela parko flarante blankajn migdalarbajn florojn kaj mielajn mimozflorojn ni boate revojaĝis sur ŝaŭmaj ondoj laŭ sun-ora vojo.

Alian tagon ni ekskursis al vilaĝo *Roquebrune* en la montoj, kiuj ĉirkaŭas nian hotelon. Ni vojaĝis inter vitejoj kaj kampoj, vizitis olivoleo-fabrikon kaj lernis kiom da laboro necesas por fari unu litron da olivoleo de ok kilogramoj da olivo.

Unu el la preĝejoj de la vilaĝo oni konvertis en ĉokoladmuzeon kun malnovaj *Suchard*

kaj alimarkaj skatoloj kun malnovaj bildoj kaj dekoraĵoj. Interesaj memoroj por tiuj, kiuj frandis tiun ĉokoladon en sia infanaĝo. Apude estis ĉokoladfabriko kun gustumado de bongusta malhela ĉokolado. Laŭ belaj vojoj ni malsuprenvojaĝis al nia hotelo apud la maro.

Ĉiun tagon ni promenis laŭlonge de la strando sur sablo kaj rokoj. Saliko vadis en la sala akvo kaj malvarmumis. Alian posttagmezon *Simone* kaj *Kerstin* promenis, parolis kaj eĉ dormis sur la strando.

Trifoje tage ni ĝuis plej varian, plej bongustan francan manĝaĵon bufedan, diversspecajn fiŝojn, marfruktojn, viandon, multspecajn legomojn. Kune kun ĉiu manĝaĵo, krom la matenmanĝo haveblis senpage du specoj da vino. La ĉeno al kiu apartenis la hotelo nomiĝis *Vacanciel*, kaj por tiu, kiu ĵus forvojaĝis de glitaj stratoj kaj vojoj tio estis vera ĉielo. Ekster la grandaj fenestroj de la manĝejo kreskas grandegaj pinarboj tiel proksime, ke ni facile povis imagi, ke ni sidis sur la branĉoj de la arbo dum ni manĝis.

Okazis kursoj dum la antaŭtagmezoj kaj unu posttagmeza leciono ĉiun tagon. La intenco de la kurso ja estis evolui kaj lerni pli pri kaj en Esperanto. Vespere oni prezentis diversajn filmojn i.a. profesie belegan filmon pri Sumatro kaj informoplenajn filmojn pri diversaj esperantoaranĝoj. *Peter Zilvar*, *Zsofia Kórody*, *Perla Mielo* kaj *Daniel Moirand* instruis la tri grupojn de ”gelnantoj” el 11 landoj. La plej foraj el Kubo kaj Skandinavio (Saliko kaj Kerstin), la plej multaj el Francio. Okazis ioma krokodilado kaj ĉeestis ankaŭ du-tri kunuloj, kiuj venis nur por ĝui la regionon, ne por partopre-

ni la lecionojn. Iu diris ke li biciklis 200 kilometrojn tage!

Entute ni estis 90 partoprenantoj.

Christine Graissaguel, unu el la administrantoj, multon faris por glatigi al ni etajn problemojn. La ĉeforganizanto *Monique Prezioso* devis pasigi la tutan semajnon en hospitalo pro grava malsano. Kerstin havis okazon saluti ŝin la lastan tagon. Ŝia edzo *Laurent-Pierre* prizorgis per medikamento nin ĉiujn, kiuj estis atakitaj de vomado kaj gripo.

Post la agrabla semajno en *Les Issambres* la nordlandanoj, Saliko kaj Kerstin, vojaĝis al Nico. Montriĝis ke tie ni sukcesis trovi hotelon ĉe *Rue Rivoli* tre proksime al *Promenade des Anglais*, kiun Kerstin deziris vidi. Montriĝis ankaŭ, ke la fino de la Karnavalo okazis dum nia restado. Ni travivis la plej belan piroteknikaĵon kaj staris tiel proksime, ke la "steloj" multkoloraj preskaŭ pluvis super ni. Minuton post minuto venis pli kaj pli miraklaj elpafoj da bunta pluvo kaj ni opiniis, ke la lastaj fortoj estis elĵetitaj, sed venis novaj kaj novaj, pli kaj pli belaj multkoloraj stelpluvadoj. En la ĉielo aperis ruĝaj stelkoroj, ruĝaj kaj verdaj ringoj, oraj fontanoj ŝprucis rekte el la ondoj kaj oraj palmoformaj ŝprucadoj pli altan.

Laŭ la tuta Promenado situas hoteloj, kazino, Operejo ktp, ĉiuj en la stilo de La Bela Epoko aŭ Jugendstilo. Ni promenis laŭ la maro ĝis La Malnova Urbo, kie ni ĉirkaŭiris en la malnovaj stratetoj inter altaj domoj. Ekster la fenestroj pendis lavitaj tolaĵoj kiel sur fotoj de sudeŭropaj urboj. Ni eniris du-tri el la barokaj

preĝejoj, plenplenaj da artaĵoj, tro plenigitaj laŭ Kerstina gusto, sed tio ja estas la baroka stilo. Oni devas pli studi kaj koni la diversajn artaĵojn por plene kompreni. La muziko, kiu sonas en la preĝejo kreis agrablan restadon ripozan.

Ni trovis etan hindan restoracion, kie ni ĝuis ŝafidaĵon kuiritan hindamaniere. Facile oni povas transportiĝi al Hindio (Barato). La lampoj, sunombreloj, murdekoracioj, statuetoj, la malva sario de la rapidmova svelta kelnerino kreis fabelan etoson, ĉefe pro la multaj koloroj, nuancoj kaj aludoj al hinda mitologio. Posttagmeze ni promenis sur la Kastela Monto, ĝuis la arbojn, la belan rigardon super la urbo kaj super La Golfo de Anĝeloj. De sur la pinto de la monto falis granda akvofalo. Ni promenis ankaŭ en la tombejo, kiu enhavas belegajn statuojn, kaj enrigardis la judan tombejon, ĉe kies pordego urnegoj plenigitaj de la cindroj de la viktimoj de holokaŭsto aŭ de sapo farita el ilia karno.

Unuan tagon ni matenmanĝis en la ĉarma manĝejo de *Villa Rivoli*, la duan en tipe franca eta kafejo/trinkejo, kie ni ricevis tute novbakitajn *baguette*!

Ekster la hotelo ni trovis buson, kiu kondukis nin rekte al la flughaveno, nur 5 km for. Post trihora flugado ni alteriĝis en Arlanda/Stokholmo. La tago finiĝis apud la hejmo de Kerstin en nove malfermita balkana restoracio kun ŝafidaĵo laŭ balkana kuirarto. Saliko flugis al Finnlando la 8an de marto.

Kerstin Rohdin
Saliko

Joululahjapulman ratkaisi: Kirja tai kaksi! 10€/kpl (+lähetys kulut)

**Tohtori Zamenhof
ja kansainvälinen kieli**

Kirja esperantosta ja ihmisestä sen takana

**Stano Marček
ESPERANTO mutkattomasti**

Kuvittanut Linda Marčeková

Suomeksi toimittanut Tuomo Grundström

TILAUKSET:

Suomen Esperantoliitto ry, Siltasaarenkatu 15 C 65, 00530 Helsinki, p. 044 2642 742 eafmendoj@esperanto.fi



Sed kie estas la pagodo?

Foto: Alike Geveke



Esperanto-societo en Turku vizitis budhisman templon sabate 9.6.2012.

Kiam oni volas prezenti al mezeŭropaj esperantistinoj vidindaĵojn en Turku, oni eble ne plej unue pensas montri la budhisman templon en iu malproksima antaŭurbo. Turkuaj esperantistoj tamen faris tian elekton 9.6.2012 kiam ili kune kun svisino kaj germanino vizitis la Lotus-templon en urboparto *Moisio*.

Ĉar la ĉi-jara UK okazis en Vjetnamio ni laŭ kutimo volis konatiĝi kun la lando antaŭe. Kion ni scias pri la lando: malmulte; eble nur, ke unu el la ĉefreligioj en Vjetnamio estas budhismo. Feliĉe en nia propra urbo jam dum pli ol tridek jaroj loĝis originalaj vjetnamanoj, kiuj nun eĉ konstruas budhismam templon. Ni ricevis kontakton kun loka reprezentanto de la eklezio. Li proponis al ni eblecon viziti la templon la 9an de junio kaj partopreni ilian *Wesak*-feston, naskiĝtagon kaj baptofeston de Budho. Tiam venos partoprenantoj ankaŭ el Helsinki kaj Tampere.

La tago estis malvarma kaj pluva. Iun grandan pagodon ni ne vidis, la konstruaĵo estis nefinita, sed tamen iom similis al Aziaj temploj. Pro incendio antaŭ unu jaro la konstruado interrompiĝis. Verŝajne la incendion kaŭzis knabetoj per siaj alumetludoj, ne teroristoj. La urbo donacis monon por rekonstruado, sed

multo ankoraŭ mankas.

Antaŭ la ceremonio nin salutis reprezentantoj de la eklezio kaj ni havis eblecon demandi pri la religio kaj pri vjetnamanoj en Finnlando. Ĉi tie loĝas pli ol 3000 vjetnamanoj, plejmulto jam havas finnan naciecon. Ili bone alkitimiĝis kaj laboras en multaj profesioj. En ilia naskiĝlando la kutimoj diversas de la finnaj. Pli junaj respektas pli aĝajn. Pro respekto estas malfacile diri la vorton "ne" kaj oni devas eltrovi taŭgajn esprimojn. Tre gravaj estas familiaj rilatoj, kolektiveco, obeemaj infanoj.

Paco. Trankvilo. Amikaj rilatoj. Respekto de homo. Tion ni konkrete travivis, kiam vjetnamanoj venis por saluti nin – ne manpreme, sed sinklinante. Eĉ la monaĥo venis por saluti nin en sia flava silka kaftano. La feston partoprenis homoj en ĉiuj aĝoj. Infanoj kuris tien kaj reen, same kiel en niaj festoj.

La ceremonio okazis en la festosalono. En la antaŭa parto estis altaro kun tri grandaj lumigitaj statuoj de Budho, ĉiu el ili ĉirkaŭita de haloo, kiu tutan tempon ŝanĝis sian koloron. Sur la altaro estis ankaŭ multe da floroj kaj brulantaj kandeloj. Plej proksime al la publiko staris malgranda Budho-statuo en puto, kie floris florfolioj. La planko antaŭ la altaro estis kovrita per orientaj tapiŝoj, sur kiuj parto de la eklezianoj sidis sur siaj genuoj en malhelbluaj vestaĵoj. Ili devis iam kaj tiam starigi kaj denove eksidi. Viroj sidis maldekstre, virinoj dekstre. Iliajn ŝuojn ili lasis ekster la tapiŝkovrita parto. Plej multaj partoprenantoj sidis sur benkoj kiel ni. Laŭta muziko estis aŭdebla preskaŭ la tutan tempon sed ankaŭ monotona kantado kaj trumpetado. Ni sidis sur seĝoj kaj pensis: Ĉu ni estas en Turku en Finnlando? Rigardo tra la fenestro rakontis, ke ekstere kreskis finna arbaro.

La vizitanta monaĥo faris sufiĉe longan paroladon, kiu ankaŭ enhavis ŝercojn, ĉar la publiko malantaŭe en la salono ridis. Interpretisto ne kuraĝis interrompi lin kaj tial ĉi ni ne

scias la enhavon. Fine ĉiuj verŝis akvon sur la Budho-infanon, eble en espero de feliĉa estontecco.

Post la ceremonioj ni ricevis varman supon

kaj skatolon da orientaj manĝaĵoj. Sur la korto eblis trinki kafon aŭ teon.

Leena Tiusanen, Paula Harju el EST

Spertoj pri la tutmonda KER-ekzamenseso

Foto: Anna Ritamäki-Sjöstrand



Sirkka Mattlin kaj Sylvia Hämläinen kun la ekzamenaj dokumentoj antaŭ sendo al Hungario.

Mi partoprenis la tutmondan skriban KER-ekzamenon en Helsinko la 9an de junio. Ĉi tiu estis la unua fojo, kiam mi partoprenis lingvoekzamenon laŭ postuloj de Komuna Eŭropa Referencokadro (KER).

Mi iom nervozis antaŭ la ekzameno pri mia sukceso, sed finfine intereso pri la ekzameno kaj scivolemo pri miaj kapabloj superis la vanan nervozecon, kaj mi decidis partopreni la plej altan ofertitan nivelon, C1.

La kandidatoj alvenis ĉiuj sufiĉe frue al la ekzameno kaj la etoso estis iel atendema kaj ankaŭ scivolema. Unue okazis la oficialaĵoj: post kontrolo de identigiloj estis tempo por komuna fotado kaj sekve la sesion oficiale malfermis nia honora protektanto *Arvo Karvinen*, kiu estas prezidanto de la Ligo Internacia de Blindaj Esperantistoj. Li rakontis pri la ejo, *Pengersali*, kaj deziris sukceson al ni. Ni aŭdis ankaŭ salutojn de *Katalin Kováts* per komputilo.

Post la komenca cerbumado kaj eĉ ioma nervozeco ĉiuj diligente kaj atenteme laboris por ricevi bonan rezulton en la ekzameno. Al mi aparte plaĉis la trankvila etoso en la ekzamenejo. Mi

opiniis, ke la elekto pri la loko bonege sukcesis, ĉar unuflanke ne estis prema lerneja etoso, sed la loko estis pli hejmeca kaj samtempe tamen sufiĉe trankvila, granda kaj bone aerumita kaj lumigita. Bone komforte do. Plian helpon donis al ni la scio, ke niaj praktikaj lokaj organizantoj, *Sylvia* kaj *Sirkka*, zorgis pri ni per regula atentigo pri la restanta tempo. Aldonan komforton portis al ni la apuda necesejo kaj ankaŭ propra proviantaro, kiun ni rajtis kunporti.

Mi pensis, ke mi sufiĉe prepariĝis por la ekzameno utiligante ekzemple la libreton “Esperanto de nivelo al nivelo”, sed tamen la ekzameno iel surprizis min. Iel mi ne povis imagi kiel aktualajn temojn la ekzameno vere havas kaj kiel variaj la taskoj estas. Finfine la surpriziĝo estis nur pozitiva afero, ĉar mi pensas, ke ĝi helpis almenaŭ al mi esti pli atentema malgraŭ tio ke finfine estis bezonata la tuta uzebla tempo. La uzata libreto tamen donis relative bonan impreson pri la ekzameno. Post la ekzameno ĉiuj certe sentis ian liberiĝon kaj jam gaje interŝanĝis opiniojn kaj spertojn. Tre scivoleme ni atendis la rezultojn, kaj kiam ili finfine aperis kelkajn semajnojn post la ekzameno, tuj kontrolis ilin rete kaj pli-malpli kontentis.

Mi iom pensis ankaŭ pri tio, ke ankaŭ multaj aliaj kandidatoj tutmonde ekzameniĝis ĝuste samtempe kun mi. Mi tre ĝojas, ke mi kuraĝis utiligi ĉi tiun eblecon kaj intencas fari iam ankaŭ la buŝan parton. Mi volus kuraĝigi ankaŭ aliajn testi sian lingvokonon per oficiala ekzameno. Krom la konfirmo pri siaj konoj, la oficiala, ŝtate agnoskata ekzameno montras, ke nia lingvo ja estas valora kaj funkcia lingvo. Pliaj ekzameniĝintoj certe alportos plian seriozecon al nia afero.

Paula Niinikorp



Muista lehdistä: Utissillisalaattia esperantosta

Esperanto-lehtijuttujen aiheina oli useassa lehdessä kielen 125-juhlavuosi ja kansainvälinen esperantotutkinto. Lisäksi parissa yksittäisessä jutussa esiteltiin esperantisteja, Lapista Harvardiin opiskelemaan päässyt *Jonne Sälevä* ja edesmennytyhdysvaltalainen tieteiskirjailija ja *Harry Harrison*. *Tuomo Grundströmin* kirjoitus ”Esperantoa puhuttu 125 vuotta” julkaistiin Turun Sanomissa 25.7.2012 ja Kalevassa päivää myöhemmin lehtien pääkirjoitussivun artikkelina ja muutamassa muussakin lehdessä, ruotsiksi Čbo Underrättelserissä.

Kielen menestyksen syyt

Tuomo esittelee kielen synnyn Puolassa ja sen leviämisen varhaisvaiheet eri maissa. Hän arvioi esperanton menestykselle olevan kolme syytä: sen sanasto on koottu olemassa olevista kielistä, mutta kielioppi on rakennettu niukaksi ja helposti omaksuttavaksi, *Zamenhof* luopui kielen tekijänoikeudesta ja kieli liittyi tiettyyn arvomaailmaan: Se oli kansainvälinen ja yhteinen eikä liittynyt yksittäiseen valtioon tai kansaan ja se on vakiintunut eläväksi kieleksi. Sillä on pysyvä käyttäjäkunta ja sitä käytetään arkipäiväisesti kirjallisuudessa, lehdistä ja netissä sekä kansainvälisissä tapahtumissa. Kalevassa oli lisäksi 26.7.2012 uutinen esperanton vuosijuhlasta, kielen synnyn, rakenteen ja sisällön esittely sekä maininta, että Oulun Esperantoseura järjestää juhlatapahtuman Taivalkoskella puheenjohtajansa *Aini Vääräniemen* vetämänä.

Esperantoa koulussa

Jorma Ahomäki kirjoitti Turun Sanomissa 28.7. Lukija kolumni -palstalla 1950-luvun lopulla ja -60-luvun alussa toteutetusta esperanton opetuksesta Rauvolan kansakoulussa. Sen ansiosta koulussa käyneet esperantoa puhuvat vieraat ovat antaneet oppilaille kosketuksen kansainvälisyyteen ja elävöittäneet opetusta. Ahomäki mainitsee myös esperanton 125-vuotisjuhlavuoden ja maailmanlaajuisen esperan-

totutkinnon järjestämisen ympäri maailmaa. Lisäksi japanilaiset ovat toteuttaneet Sumoo-projektin, jossa osallistujat lukevat esperantonkielisiä kirjoja ja kertovat Japaniin lukemisen etenemisestä.

Esperanto valtaa Ahvenenmaan

Ahvenanmaalaiset lehdet *Ålandstidningen* 11.5.2012 ja *Nya Åland* 22.5.2012 esittelivät kansainvälisen esperanton kokeen. *Nya Åland* haastatteli *Anna Ritamäki-Sjöstrandia*, joka osallistui toiseksi ylimmällä kielitaidon tasolla. Anna ei toistaiseksi tuntenut ketään esperantisteja Ahvenanmaalta, mutta toivoi heiltä yhteydenottoa. Lisäksi hän kertoi, miten oli aloittanut kielen opiskelun ja miten oli sen avulla saanut kansainvälisiä yhteyksiä ympäri maailman. Hän kertoi muuttaneensa Ahvenanmaalle avioliiton kautta Kemiöstä. – Esperantoliiton Ahvenanmaan syyspäivistä 14.–16.9. teki haastatteluja paikallislehtien lisäksi *Hufvudstadsbladet*. Kokeesta oli myös Turun Sanomissa uutinen 14.5. Siinä mainittiin mahdollisuudesta suorittaa koe ympäri maailmaa, mm. Helsingissä. Koe on eurooppalaisen kielitaidon arvioinnin mukainen.

Esperantolla Harvardiin Rovaniemeläinen Lapin Kansa kirjoitti 25.4.2012 Yhdysvaltoihin Harvardin yliopistoon päässeestä *Jonne Sälevästä*. Hän oli yliopistoon pyrkiessään maininnut, että osaa esperantoa, ja arveli, että se avitti valintaa. Esperantoa Sälevä oli oppinut, kun oli lukioaikana Saksassa Dresdenissä vaihto-oppilaana. Hän osallistui paikallisen esperantokerron tapaamisiin. Myöhemmin hän on käynyt esperantomatkoilla Italiassa ja Ukrainassa. Helsingin Sanomat kirjoitti yhdysvaltalaisen tieteiskirjailija *Harry Harrisonin* kuolemasta. Lehden mukaan hän on ”esperanton asiantuntija”. Vuonna 1985 hän sai Esperanton maailmanliiton (UEA) kunniajäsenyyden.

Jukka Noponen

Suomen Esperantoliiton jäsenjärjestöt

Muutokset ja lisäykset tälle sivulle: Esperantolehti/EAF, Siltasaarenkatu 15 C 65, 00530 Helsinki, s-posti eafgazeto@esperanto.fi.

Suomen Esperantoliiton paikallis- ja jäsenjärjestöt:

- ♦ Helsingin Esperantoseura / Esperanto-klubo de Helsinki, Siltasaarenkatu 15 C 65, 00530 Helsinki. www.esperanto.fi/helsinki jukka.p@esperanto.fi (Jukka Pietiläinen)
- ♦ Iisalmen Esperantoklubi / Esperantoklubo de Iisalmi, (Onni Kauppinen) Uudispihantie 298, 74100 Iisalmi. ☎ 0500 813 530 onni.kauppinen@pp.inet.fi
- ♦ Jyväskylän Esperantokerho / Esperantoklubo de Jyväskylä (Seija ja Kari Kettunen) Keihäsmiehenkatu 3, 40630 Jyväskylä. ☎ 040 867 2743 www.esperanto.fi/jyvaskyla
- ♦ Oulun esperantoseura / Esperanto-societo de Oulu ry (Aini Vääräniemi), Vääräjärventie 26 A, 93590 Vanhala www.esperanto.fi/oulu aini.esp@hotmail.com
- ♦ Salo Esperantoseura / Esperantoklubo de Salo (Matti Wallius) Eräpolku 1, 25130 Muurla matti.wallius@ebaana.net
- ♦ Esperantoseura Antaüen ry. / Esperanto-societo Antaüen, Satakunnankatu 30 C 6, 33210 Tampere. www.esperanto.fi/tampere (Jukka Laaksonen: jvaletto@kolumbus.fi) ☎ 050 5829 248)
- ♦ Turun Esperanto-yhdistys ry. / Esperanto-societo en Turku (Tiina Oittinen), Puutarhankatu 26 A 11, 20100 Turku. tiina.oittinen@pp.inet.fi
- ♦ Suomen opettajien esperantoyhdistys / Esperanto-Ligo de Finlandaj Instruistoj, (Sylvia Hämäläinen) F. E. Sillanpään katu 2 C 46, 33230 Tampere. sylvia.h@kolumbus.fi ☎ 050 321 4313. Tilinro: FI08 4450 2320 0836 06 HELSFIHH (445023-283606)
- ♦ Sokeiden esperanto-yhdistys Steleto. (Ritva Sabelli) Pietarinkatu 10 D 27, 00140 Helsinki. ☎ (09) 660 651 steleto@pp.inet.fi
- ♦ Suomen nuorten Esperantoliitto / Finnlanda Esperantista Junulara Organizo (FEJO) Siltasaarenkatu 15 C 65, 00530 Helsinki. fejo@esperanto.fi. Tilinro: FI83 5630 0020 2136 06 OKOYFIHH (563000-2213606)

Jäsenyhdistysten jäsenet ovat automaattisesti Suomen Esperantoliiton jäseniä, yhdistykset hoitavat jäsenmaksut liittoon. Esperantolehden

hintaa jäsenille on 14 e tilattuna jäsenjärjestöjen kautta. Liittoon voi myös kuulua henkilöjäsenenä, jolloin jäsenmaksu on 20 e sisältäen Esperantolehden. Nino Runeberg -seuran jäsenmaksu on 40 e. Lisätietoja jäsenyhdistyksiltä ja liiton toimihenkilöiltä.

Lahdessa on esperantoharrastajien ryhmä, joka kokoontuu tarpeen mukaan. Lisätietoja saa Börje Erikssonilta (EAF:n hallituksen varajäsen). esperarto@phnet.fi.

Lappeenrannassa toimii aktiivinen esperanton harrastajien ryhmä, jolle voi lähettää postia osoitteeseen (Irja Miettinen) Esperantogruppo de Lappeenranta, Yrjönkatu 6-8 A 1, 53600 Lappeenranta.

Aktiivisia harrastajia on myös mm. Hämeenlinnassa, Mikkelissä, Porissa, Raumalla ja Taivalkoskella. Paikkakuntien yhteyshenkilöistä saa tietoa Suomen Esperantoliitolta.

ESPERANTOLEHTI

ilmestyy vuonna
aperas dum la jaro

2012

Nro	Limdato	Aperas
5/2012	15.11.	en decembro

Ilmoitushinnat ♦ Anonprezoj

Ulkopuoliset mainostajat /

Ekster membraro:	Jäsenet / Membroj:
1/1 sivu/paĝo 100 e	1/1 sivu/paĝo 50 e
1/2 sivua/paĝo 60 e	1/2 sivua/paĝo 30 e
1/4 sivua/paĝo 40 e	1/4 sivua/paĝo 20 e

Sendu la anoncojn aŭ rete al la redaktojo: eafgazeto@esperanto.fi aŭ poŝte al la oficejo: Esperantolehti/EAF, Siltasaarenkatu 15 C 65, 00530 Helsinki.



Esperanton 97. maailmankongressin julkilausuma

Esperanto 125 vuotta sillanrakentajana



Kongressin yli 800 Vietnamin Hanoiin kokoontunutta osanottajaa korostaa esperanton merkitystä kieleinä, joka on perustettu rauhan, ystävyyden ja keskinäisen kunnioituksen ihanteille.

Esperanto tarjoaa kaikkien maitten kaikille ihmisille käytännöllisen ja tehokkaan keinon suoriin yhteyksiin, keskinäiseen tutustumiseen ja syvään ystävyyteen.

Esperanto tarjoaa ristiriitojen ja epäoikeudenmukaisuuksien vaivaamalle maailmalle rauhan kulttuuria, jota rakentavat kaikkien maanosien ihmiset tasa-arvon hengessä.

Esperanto tarjoaa Yhdistyneiden Kansakuntien vuosituhattavoitteiden toteuttamisen pyrkivälle kansainväliselle yhteisölle kehityksen tietä globaaliin kumppanuuteen, jossa yhteistyökumppaneita eivät ole vain valtiot keskenään, vaan ihmiset keskenään.

Esperanto on 125 vuotta ilmestymisensä jälkeen yhä laajemmin käytössä ystävyyden, rauhan ja kehityksen siltana. Sitä kehitystä edistää toinen globaali väline, Internet, mitä osoittaa mm. se, että se on Googlen käännösautomaatin järjestyksessä 64. kieli.

Kutsumme kaikkien maitten ihmisiä käyttämään ja rakentamaan siltaa oikeudenmukaisempaa ja rauhallisempaa maailmaa kohti, maailmaa, jossa on tilaa kaikille kielille ja kulttuureille.

Dato	Loko	Evento
15.12.2012	Helsinki	Zamenhof-festo
20.–27.7.2013	Rejkjaviko (IS)	98a Universala Kongreso (UK)
8.–12.7.2013	Orivesi	Somera kurso de EAF

Esperantolehti on mukana kirjamesuilla Kulttuurilehtien Liiton, Kultti ry:n osastolla
Turussa 5.–7.10.2012
Helsingissä 25.–28.10.2012

Seuraava numero ♦ Venonta numero

Seuraava numero ilmestyy joulukuussa. Jutut 30.11.2012 mennessä toimitukseen. La venonta numero aperos en decembro. Artikoloj ĝis 30.11.2012 al la redakcio. Osoite/adreso: Esperantolehti/EAF, Silta-saarenkatu 15 C 65, 00530 Helsinki, s-posti/rete: <eafgazeto@esperanto.fi>.

Kopio Niini, Tampere 2012